



Reprezentantoj el 20 landoj en Avignon



„Mi ne komprenas, ke ĉio tiel glate funkcias; ĝi ne povas bone fini“, orakolis LKK - prezidanto k-go Motto la unuan kongrestagon. Li ne menciis kiom da malfacilaĵoj estis jam venkitaj, kiom da horoj oni oferis por sukcesigi la 21-an IFEF-kongreson, kiom da kvereloj, cagrenoj, tamen ankaŭ helpemon kaj solidarecon ili spertis. Specialan zorgon la organizintoj dediĉis al la gekolegoj el Orienteŭropaj Landoj kaj al multaj ili helpis malfermi la limon. Konsidere la grandan nombron de pli ol 500 partoprenantoj el 19 landoj apenaŭ menciindas, ke kelkaj personoj eluzis la servojn de LKK por preferataj celoj kaj ne ĝenis la kongreson per sia ĉeesto.

Netaksebla progreso de internacia kaj francnacia agnosko estas kongresrezultoj atingitaj per la persistaj klopodoj de estraro, komitato kaj landaj asocioj. Tiu ĉi raporteto ne volas anticipi la oficialan protokolon, sed nur, ne insistante pri kompleteco, rememorigi, glosi, aprezi kelkajn okazaĵojn el la varia programo, la vigla laboro, la kolora vivo de nia kongreso en Avignon kaj ankaŭ el la multifaceta viglo kaj beleco de nia kongresurbo kaj ĝia lando. Se la objektivo de la observanto ŝajnas jen konkava, jen iom konvekso, la raporto mem vere ne estas objektiva, sed perspektiva laŭ la vidpunkto de kongresano, kiu ne plensukcese klopodis kompreni ĉiujn organizajn misterojn, sed tamen revenis hejmen kontente kun abundo da belaj memoroj kaj — fine, ne laste — kun sincera danko al la francaj geamikoj.

Amika saluto de Provenco

Afable LKK salutis ĉiun alveninton per saketo da freŝe rikoltitaj ĉerizoj, je kiu tempo en Nordgermanio apenaŭ floras la arboj. Aliaj kvin agrablaj novaĵoj, tiel surprize novaj en niaj kongresoj, ke ankoraŭ mankas la konvena faktermino: kvin junaj fraŭlinoj en ĉarma uniformo kiel „gastigantinoj“ (aŭ Hôtesses) akceptis, informis, gvidis, tradukis kaj ĉiel helpis la gekongresanojn dum tiu semajno. Ankoraŭ kroman saluton neordinaran la Provenco rezervis al siaj gastoj. Konata kiel pseŭdonimo de provenca poeto, konata precipe al ni kiel trajno luksa kaj rapida, la Mistral sin nun prezentis ankaŭ laŭ origino de sia nomo, kiel malvarma ventego el la franca Centra Montaro, vento ŝatata de la loĝantaro, blovego puriga, kiu forbalaas muŝojn, kulojn kaj polvon. Kvankam post komenca varmego nun la ne kutimiĝintaj vojaĝantoj spertis kataron kaj senvoĉecon primokatan, tamen la indiĝenoj asertis, ke ĝi ne estas la vera Mistral, sed nur milda proveto, speciale aranĝita por la kongreso.

Paca okupacio

Abundo ankaŭ da prezentoj, ekskursoj, fakaj kaj organizaj kunvenoj; LKK solvis la problemon kiel trapasigi dumseman programon en sep tagoj. La funkcioj estis senpaŭze okupitaj, kvazaŭ anhelante rapidis inter kunsidoj, manĝejoj kaj hoteloj; pluraj laŭdire eĉ vidis kelkajn stratojn apud la ĉiutaga vojo: trankvile — kongresejo. Sed ankaŭ la turistoj ne enuis. „La kongressemajno ne estas por dormi“ konsolis kolego. Li ne havis la ŝancon loĝi apud la verve frekventita nokta amuzejo. La nokta vivado estas pli ŝatata, se ĝi ne ondas sub la propra fenestro.

Cie en la urbo grupe kaj individue renkontiĝas kongresanoj el 20 landoj, sur la bulvaroj, en la parkoj, apud la bordo de l'Rodano, en magazenoj kaj butikoj, sur la Strato de la Respubliko, ĉe la Placo de l' Horloĝo, vole-nevole demonstrante nian pacan okupadon. La efiko estas evidenta. Bonege funkcianta gazetara kaj informa servo lerte utiligas la konjunkturon. La ĵurnaloj ĉiun tagon raportas novaĵojn el la kongreso, ofte kun ilustraĵoj. Tekstrubandoj, flagoj en la ĉefstrato, koloraj kongresafiŝoj en multaj montr-fenestroj krome atentigas la homojn pri nia laboro kaj kreas tiun etoson, kiu nutras nian esperon pri konvinka diskonigo de niaj celoj. Dezirinde, ke kun sama kapablo oni ekspluatos la sendube vekitan scivolemon de la publiko.

Napoleon III. kiel tradicionscia amanto de belarto kaj arkitekturo, ne nur en Parizo trovis protektindajn kulturmonumentojn, sed ankaŭ al la 4000-jara Avignon dediĉis specialan atenton. Interesuloj eksciis, ke estis li, kiu i. a. ankaŭ konserve riparigis la 5 kilometrojn longan remparomuron el la 14a jarcento, kies ringon interrompas nur la breĉoj por la ĉefstratoj kaj la rodanflanka kruta roko, kiu portas la fortikan episkopan civiton. Same ĉi tie troviĝas la kapo de la multe prikantata ponto Saint Benezet, konstruita de tiu ĉi sanktulo; sed ĝia historio estas iom legende neaŭtentika. La malnova urbo ĉirkaŭata de la muro topografie apenaŭ ŝanĝiĝis deponat la konstruado de la fervojo. En la labirinto de ĝia kerno la fremdulo misire konfuziĝas. Kolorriĉa vogleco post la siestaj horoj pulsas inter pitoreskaj domoj. Oni admiras la aŭtomobil-artistojn, kiuj scipovas konduki siajn ĉarojn tra stratetoj, kies liber-profilo apenaŭ atingas tiun de la veturiloj.

Solenoj kaj laboroj

Abundis same la laboro en la kunsidoj de komitato, komisionoj kaj publiko, tiel ke diskutoj suferis sub la diktatora horloĝmontrilo kaj kelkaj sufiĉe gravaj demandoj devis resti netraktitaj. La Solena Malfermo efikis al la partoprenantoj ne dezirinde solena, ĉu pro neesto de ornama flordekoro, ĉu pro manko de kadruma festmuziko. Notinda en la pluskonto de nia reputacio estas la fakto, ke la scenejon okupis altrangaj reprezentantoj el politikaj kaj fervojaj administracioj, el kulturaj kaj sindikataj organizoj; ĉiuj esprimis simpatian kaj favoron. Kiun enuas tia solenaĵo, tiu atente observu la kontrastajn temperamentojn de la landaj delegitoj, kiuj ĉu serioze, hezite, distin-

ge, ĉu amuze, ŝerce, eĉ babileme plenumas sian taskon prezenti la salutojn de la federaciaj asocioj.

La germana fervojista sindikato GDBA, kiun reprezentis k-go Kiefer, antaŭ tiu internacia kolegaro oficiale deklaris ankaŭ sian korporacian aliĝon al GEFA. IFEF-prezidanto Gießner post raporto pri evoluo kaj progreso de la organizaĵo insiste proklamis la moton por la venontjara laboro. Ni rompu la limojn ĉirkaŭ ni, penetru tra verdstelanismo kaj indiferenteco, kio premisas energian persiston, valoran kvaliton kaj altan kulturen nivelon en nia laboro. La observanto de tiu ĉi brila kongreso tamen konstatas, ke Esperanto vivas malgraŭ la Esperantistoj. En la fino de la solenaĵo tamen ne tute feliĉigis la kvalito de la himno-prezento, kvankam aŭdigita per rafinita teknika ĉeno sonbendo-laŭtparolilo-mikrofono-amplifikatoro-parolilaro. Estas diskutinde, ĉu en kunveno solena kun nacilingva publiko oni ne prefere rezignu pri verda kulto aŭ almenaŭ prezentu la himnon en digna formo. Certe en la fina kunveno nia kanto havu sian fiksan lokon, ĝi pli konvenas al la emocio de la granda adiaŭo.

Akcepto de rumana asocio en nia federacio, la honorigo pro elstaraj meritoj, la modernigo de nia gazeto, rezultoj de voĉdonado, statutkomisiono kaj organizaj aferoj estas punktoj, pri kiuj kompetentas la LIF-raporto. Altigo de la kotizo estas antaŭvidebla kaj aprobita. Nian asocion GEFA reprezentis kvar komitatoj kaj unu observanto. Jam eblis aliĝi por Rimini, kien k-go Gimelli invitis la 22-an kongreson.

Ke la urbestra moŝto logis al sia akcepto multe pli da gastoj ol invititaj, pri tio certe ne repondicis liaj simpatiaj salutvortoj. Prezidanto Gießner kun danko pro la afabla bonvenigo en Avignon transdonis kiel donacon elstaran verkon de nia literaturo. Ankaŭ pluraj landaj delegacioj dediĉis kelkajn tipajn memorajojn. La urbestro noble regalis siajn gastojn per delikata, sukcenkolora muskatvino kaj ilustritaj butonkeksoj.

Esenco de la kongreso: Faka laboro

Malgraŭ la ampleksa turisma programo, ni nepre ne modeste silentu pri la faka motivo de niaj kongresoj. Tiel memkomprenebla ĝi estas, ke la kongreslibro ĝin ne mencias per unu vorto. La prezidanto plurfoje aprezis la fakan laboron kiel spinon kaj esencon de nia faka organizaĵo. Ni vere ne havas kaŭzon honti pri la kvalito de niaj prelegoj kaj pri la ni-

Carl-Johannes Rummel ne plu inter ni

Tute neatendite atingis nin en Avignon la sciigo, ke nia longjara membro, em. kolego Carl-Johannes Rummel grave malsaniĝis. Tamen ni ankaŭ eksciis, ke laŭŝajne la sanstato jam ekpliboniĝis. Des pli konsternitaj ni estis, kiam baldaŭ post reveno el la kongreso atingis nin la komuniko, ke C. J. Rummel la 25an de majo en aĝo de 65 jaroj estas mortinta.

En tiu homo la Germana Esperanta Fervojista Asocio ne nur perdis membron, sed veran amikon, kiu dum longaj jaroj kaj sub ofte malfacilaj cirkonstancoj helpis nin laŭforte. C. J. Rummel jam ludis gravan

rolon por preparado kaj aranĝado de la 4a IFEF-kongreso Lindaŭ. Li deĵoris jam tiam en la ĉefestraro de la kultura organizaĵo BSW kiel respondeculo por ĉiuj kulturaj aferoj ĉe DB. En nia estrara laboro dum



C. J. Rummel

pli ol 15 jaroj ni ĉiam spertis lian helpon kaj rajtis peti liajn konsilojn. Ankaŭ dum la komplikaj preparlaboroj por la kongreso de Fulda li plene subtenis nin. Kiam li emeritiĝis pasintan aŭtunon, ni deziris al li kaj esperis, ankoraŭ ofte vidi lin en nia rondo, kion li eĉ promesis. La sorto alie decidis. La dua sekretariino, s.ino Kruse ĉeestis nome de GEFA en la entombiga ceremonio kaj metis florkronen sur la tombon.

Sincere ni kondolencas al s.ino Rummel kaj al la tuta familio. Ni nur povas aldoni, ke ni ne forgesos nian amikon.

GEFA-estraro

velo de la terminara laboro. Du novaj terminaroj aperis okaze de la kongreso, la hungara kaj la norvega. La agado de la fakaj komisionoj sin reciproke influas. La terminara laboro donas bazon kaj skeleton al la fakprelega; aliflanke la prelega laboro kreas la neceson kaj utiligas la rezultojn de terminaraj diskutoj. Nekontesteble fakprelegoj kaj faka literaturo estas la montrofenestro de la terminara laboro. Evidente ne sufiĉe konvinke prezentiĝis la rekomendo, pli akcenti la prelegotemojn en informado kaj programo. Ne la turismaj aranĝoj plej impresas kolegojn kaj administraciojn, ĉar potenca libertempa industrio senŝarĝigas vojaĝemulojn de ĉiu zorgo, ankaŭ de eventualaj lingvaj skrupuloj. Sed la interŝanĝo de fakaj spertoj individue en diskuto aŭ kolektive dum prelego pere de la Internacia Lingvo estas nia plej grava atuto, kiu kredigas la bezonon de Esperanto kaj firmigas la reputacion de nia federacio. Tiun ŝancon ni ne jam sufiĉe ekspluatis.

Jam la filmvespero prezentis la kongrestemon „La grandaj rapidecoj“ per bone ilustritaj eksplikoj, kiujn sinkrone tekstigis ankaŭ k-go Blondeaux. Sendube la franca fervojo plenumas gvidan rolon en esploroj kaj praktikaj progresoj. Bedaŭrinde la bonega fakprelego mem ne sole pro la maniero de prezentado havis nur malfortan eĥon. Antaŭe aranĝita faka vizito panee tre prokrastis la alve-

non de multaj interesitaj gekolegoj. Respektiva estis la diskuto. Tamen fine ĉ. 90 personoj aŭskultis la prelegon akompanatan de diapozitivaj. La 21-paĝa kompleta teksto kaj teknikaj desegnaĵoj estis je dispono, same la resumoj en Esperanto kaj germana lingvo.

Kulturo kaj amuzo

Certe kulturo povas esti amuza kaj nekontesteble niaj amuzoj havas kulturajn nivelojn. Nur unu kongresa kunsido ne estas facile klasifikebla. Malnovaj kongresanoj scias, ke LIFKAU estas sekto da frenezuloj, kiuj hereze fantomas tra nia kara verda movado. Mardon nokte okazis la malplenkunsido de LIFKAU, kies plej grava diskutpunkto estis, kiel ofte, determina lingva problemo. La simpleniga komitato honorigis tri novajn geaspiranojn per la petola insigno de membreco. Vigla diskuto sekvis pri diversaj vinspecoj: a-vinoj, bo-vinoj k. a. La sabata teatrovespero surprizis per la unua prezento de nova komedio. La ŝatataj parizaj aktoroj, al ni konataj de Münster, Fulda aŭ Strasburgo meritis la aplaŭdon. Malgraŭ sia ĵus rompita piedartiko Elisabeth Ritterspach plenumis sian promeson, kontribui al tiu ĉi vespero per pianaj sonatoj kaj dancoj de Beethoven kaj Chopin. Koncerto dimanĉon posttagmeze, balo vespere, baletdancoj kaj folkloraj prezentoj lundon, bankedo mardon posttagmeze, turismaj filmoj, ju-

nulara, vespero kun varia programo jaŭdon, kalejdoskopoj da bonkvalitaj programeroj zorgis pri distro post streĉaj tagoj.

Apud dimanĉaj diservoj unuan fojon racionalisma prelego, pli vere homaraisma, proponiĝis alternative. Inter deca tolereco kaj bridita atakemo lerte argumentis la referanto i. a. per citaĵoj el Zamenhofaj verkoj. La predikintula moŝto fervore rifuzis la honoran titolon de racionalisma pastro.

Ekskursoj

50 metrojn super akvonivelo la kongresanaro sin ŝovadas tra 2000-jara akvotubo 300 metrojn longa. Nur malmultaj kuraĝuloj riskas la promenadon sur la kovraj ŝtonplatoj de la antikva romia akvokondukilo, el kiu restis nur tiu ĉi impona pluretaĝa ponto super la rivero Gard. Ĝi ĝis la 9-a jarcento transportis trinkakvon de Uzès al Nîmes.

En Uzès la kongresturistoj trovas la interesan muzeon de radoj. Fakte oni vidas multajn radojn tie kun kompletaj aŭtomobiloj aŭ ĉiaspecaj bicikloj, kaj meze en majstre slojdita modelfervojo la direktoron mem. Simpatiantoj de LIFKAU asertas, ke tiu kolekto prezentas la plej ĉarman rubaĵon, kiun iam oni konservis. La laŭ prospekto nepre vizitindan urbon Uzès ni sukcesis traveturi en 50 sekundojn.

Arles, kiun Vincent van Gogh konatigis per siaj ardkoloraj pentraĵoj, tiun urbon, kies virinojn G. Bizet prikantus per siaj famaj suitoj, la iam romian kolonion ni konkeras en tri horoj. Mezepoka tombejo, la granda romia areno (kiu vidas ankoraŭ sangaj taŭrobatalojn) kaj la antikva teatro estas lokoj, kiun la turisto devas esti vidinta. Rapiĉu kongresanojn! Nur post reveno ni ĝuis en la oficiala kongresraporto, ke la bonega aperitivo, per kiu salutis nin Albaron estis regalajo de la firmao Ricard el Arles.

Bone preparita kaj rapide servata tagmanĝo atendas nin en la domo Méjanès. Camargue la, almenaŭ parte ankoraŭ, pratempa pejzaĝo en la Rodanodelto frusomerece sin prezentas al siaj vizitantoj. Eble post malmultaj jaroj anakronismaj aŭtarkiaj klopodoj tegos per rizkampo la idilie sovaĝan pejzaĝon. Sed ankoraŭ ĉevaloj kaj bovoj libere vivas tie. Fenikopteroj, anasoj kaj mevoj senĝene nestas kaj kovas.

La bona tagmanĝo, kaj pli multe la tagtrinko, elvokas toreo-talentojn inter la ekskursantoj. La malgranda areno arigas

ĉiujn por la amuza spektaklo de taŭroludo. Eĉ la taŭro mem kun videbla plezuro aktivas en la sensanga reciproka incitado inter homoj kaj besto ĝis tia grado, ke li neprograme sekvas la kuraĝajn batalantojn trans la protektan barieron.

En la urbo Saintes-Maries-de-la-Mer jam multaj ciganaĵoj kolektiĝis por la granda procesio okaze de la 25-a de majo. Ciganinoj deĵorantaj por la komuna cigana bonfarto dume en la urbeto provis melki la 350 turistojn esperantistajn, el kiuj siaflanke la plej ruzaj gaje kaj defende nun anticipis la petacojn per malfermita manplato kaj: „Un franc, s'il vous plaît!” Tie ĉi alboriĝis laŭ la legendo la du Marioj kun sia nigra servistino Sarah antaŭ 1930 jaroj. Nur reĝo Renato en la 14-a jarcento konstruis la hodiaŭan preĝejon.

150 kubikmetrojn sekunde elsputas la fonto de Vaucluse, kiun nutras giganta subtera rivero tondre plenigante la kanjonan fluejon. La faman triumfarkon de Orange la kongres-aŭtobusoj ĉirkaŭrapidis por atingi la ne malpli faman antikvan teatron. Relative bone konservita, iam por 15 000 spektantoj, ĝi servas ankoraŭ hodiaŭ al subĉielaj prezentoj, certe tre efikaj antaŭ la ĉ. 40 metrojn alta murkuliso. Kaj plu oni rapidas al la vinkeloj de Chatauneuf-du-Pape. Certe nur hazarde al malfruanta LIFKAU-grupo povis okazi, ke post tre apetitiva prelego pri la produktado kaj duonhora defilado preter bareleĝoj kaj miloj da ĝuon-promesaj boteloj oni adiaŭis la ekscititajn palatojn per ne-vino.

Plej perfekte organizas, kiu lerte improvizas.

La timigaj LKK-aŭguroj ne realiĝis, kontraŭe la 21-a kiel unu el la plej sukcesplenaj kongresoj restis en la memorlibro de IFEF, malgraŭ kelkaj ĉi-supraj kritiketoj, kiuj en vero ne respiegulas malkontenton, sed ofte nur amuzan karan memoreton. Senlace kaj afable ankaŭ dum la kongresa semajno la deĵorantoj helpis, konsilis kaj improvizis. Tiom da turismaj frandaĵoj estis nur por gustumi, ne por satmanĝi, kaj certe multajn logis reveni en tiun ĉi benitan landon.

Inter la plej atentaj observantoj estis la „geanimoj” de la venonta kongreso, por kiu gravaj preparoj estis jam faritaj. Volonte ni sekvas la koran inviton de geamikoj Gimelli. Ĝis revido en Rimini.

wbr

Distrikt-komisiito en Frankfurt/Main


Dum vojaĝo mi ekvidis hazarde en la stacidomo verdan stelon sur papera aŭŝo, ordinare gluita sur muro. Scivoleme mi donlaŭte legis la varbfrazojn kaj la adreson de iu samideano. Baldaŭ mi forgesis tiun aŭŝon. Lutage - denove hazarde - parolis fervojista kolego kun mi pri Esperanto kaj ties kreinto. Mi rememoris, demandis, aŭskultis kaj - estis kaptata, kaptata de la vera kaj klara lingvo ideo. Tiamaniere mi esperantistiĝis en la jaro 1952. Ek de 1953 mi fariĝis distriktkomisiito. Dum la bela kaj neforgesebla GEFA-jarkunveno en Trier mi sukcesis la ekzamenon pri lingvo-kapableco, iom pli poste la ekzamenon por kursgvidantoj. En majo 1961 mi estis nomata kiel

ekzamena komisaro kaj membro de la ekzamena komisiono por la fervojistoj. Intertempe la fervojista ekzamenkomisiono aranĝis 6 ekzamenojn.

Granda zorgo por mi estas la malintereso de la junularo. Multnombraj provoj

por ekflamigi la intereson bedaŭrinde malsukcesis. Tamen estas kaj estos la tasko de tago al tago senĉese varbi por la ideo de Zamenhof. Laŭ miaj spertoj la plej bona varbmetodo estas buŝe informi la amikojn, konatulojn kaj - precipe - niajn junajn gekolegojn de la fervojo.

Estas ofte malfacila tasko, ĉar mi mem (avo kaj estro de granda familio) ĝis nun nur vekis intereson por Esperanto - ĉe mia edzino. Sed membroj de mia grupo pli bone sukcesis kaj mi dankas elkore al tiuj fide-laj gekolegoj por ilia laboro kaj fervoro; sed mi dankas ankaŭ ĉiujn en nia distrikta grupo kiuj laboregas ofte en vera dezerto. Dankon ankaŭ al la „nuraj membroj“, ĉar ili same helpas demonstracii om de la ideo de Zamenhof.



Dr. Lang

Zusammenfassung zum Fachvortrag Schnellverkehr, insbesondere die Entwicklung bei der SNCF, in Esperanto verfaßt und vorgetragen von André Blondeaux in Avignon im Mai 1969 anlässlich des 21. Internationalen Eisenbahner-Esperanto-Kongresses

Von der Forderung des modernen Menschen nach immer größerer Schnelligkeit sind auch die Eisenbahnen nicht verschont geblieben. 144 km/h war im Jahre 1890 der Weltgeschwindigkeitsrekord auf Schienen. Er ist seitdem stetig gestiegen bis er 1955 auf französischen Strecken 331 km/h erreichte.

Für unsere Bahnen beginnt nun ein neues Zeitalter, denn in einigen Ländern wird schon im regelmäßigen Betrieb mit 200 km/h Höchstgeschwindigkeit gefahren. Die Verwirklichung des Schnellfahrbetriebs setzt nicht nur die befriedigende Lösung einiger technischer Probleme voraus, wie u. a. Bremsung, Stabilität, Beanspruchung des Oberbaues und der Fahrleitung. Technisch wären 350 km/h ohne besondere Schwierigkeiten zu erreichen. Ein viel delikateres Problem liegt z. B. in der Notwendigkeit, den schweren, verhältnismäßig langsamen Güterverkehr und den schnellen, leichten Personenverkehr auf den selben Strecken zu betreiben.

Bei Überhöhung der Kurven, die an sich schon aus einem Kompromiß zwischen Gravität und Sicherheit resultiert, müßten jetzt noch besonders der so verschiedenartige Fahrbetrieb und der Fahrkomfort berücksichtigt werden. In diesem Moment wird die Entwicklung der sogenannten Pendelwagen interessant, der durch Ausschwingen des Wagenkastens den von Reisenden als unangenehm empfundenen Überhöhungsunterschied in Kurven und Übergangsbogen ausgleicht. Die SNCF hat außerdem für regelmäßige Schnellfahrten auf vorhandenen Strecken die Bremsvorrichtungen und das Signalsystem verbessert.

Drei Hürden sind noch zu überwinden: schienenngleiche Übergänge zu sichern oder abzuschaffen; die schnellfahrenden Züge in den jetzigen Zugverkehr betrieblich einzugliedern; die notwendigen Kredite für Investitionen bereitzustellen.

Aus aktuellen Entwicklungen sind zu erwähnen:

1. die neuen Loks mit 200 und 240 km/h Höchstgeschwindigkeit;
2. der Zug „Capitole“, der seit 1957 Paris mit Limoges (400 km) verbindet in 2 Std. 54 Minuten, und Paris mit Toulouse (713 km) in 6 Stunden; die Zahl der beförderten Passagiere stieg um ca. 40 %;

3. der Turbinenzug (230 km/h), der mit dem Turbinenmotor des Hubschraubertyps „Super Frelon“ (810 kW) und zusätzlich mit einem Dieselmotor (330 kW) ausgerüstet ist.

Vom Symposium 1968 in Wien wurden die Vorstellungen der UIC-Mitglieder über die Zukunft der Eisenbahnen bekannt. Geschwindigkeiten bis 300 km/h sind noch mit schweren, konventionellen Triebfahrzeugen zu erreichen. Der Triebwagen wird jedoch bevorzugt. Die Zone über 300 km/h scheint den neuen Techniken zu gehören. Dennoch ist es nötig, alle Möglichkeiten der schienengebundenen Systeme gründlich zu erforschen, bevor Entschlüsse über völlig neue Wege gefaßt werden. Der neue Prototyp des Turbinenzugs erreicht ja bereits 300 km/h und der Bau einer neuen Strecke scheint erfolgversprechend: Paris—Lyon 430 km in 2 Stunden oder sogar 1 Std. 48 Min. Neue Techniken, die sich noch in der Erprobung befinden:

1. der Luftkissentriebwagen, der von einer Betonschiene geleitet wird; ein

Aus den Bezirken

Münster

La tradicia majekskurso kunigis migrantojn el la tuta distrikto en Bad Rothenfelde. Nebulo kaj pluvetado ne ĝenis la - ankaŭ tradician - bonan humoron je la 1-a de majo.

Regulaj kunvenoj du fojon monate laŭ diskonigata programo okazas en Münster. La ĝisnuna kunveno en la stacidomo estas fermita pro konstrulaboroj.

La GEFA-grupo Osnabrück aranĝis varbvesperon. Oni montris kolorbildojn kaj s-ano Erich Felhölter informis la ĉeestantojn pri taskoj kaj agado de nia movado. La gazeto raportis bone pri la aranĝo.

Nürnberg

Kronach sub la verda stelo Kiu rigardis sabaton la 31an de majo kaj diman-

Fahrzeug halber Größe erreichte auf der Prüfstrecke Gometz im Januar 1968 schon 422 km/h; in Kürze soll ein Fahrzeug normaler Größe auf einer Strecke von 20 Kilometern nördlich von Orléans erprobt werden;

2. der Linear-Elektromotor scheint bald das Experimentierstadium zu verlassen; seine Statorstücke sind gleichsam der Länge nach auf dem Gleis ausgebreitet, während sich der linienförmige Anker unter der Lok oder dem Triebwagen befindet.

Zusammenfassend kann man sagen, daß die Eisenbahn ihren Rivalen gegenüber konkurrenzfähig bleiben kann. Ihre Trümpfe sind Schnellverkehr und Automation.

Der vollständige Text des Vortrages in deutscher Sprache (ggf. mit Bilderläuterung) kann ab 15. Juli 1969 angefordert werden bei:

Willi Brandenburg, DB-Hochbaubahnmeisterei, D-4401 Münster (Westf.), Schaumburgstraße 13, Tel. Basa 945/1391 privat 0 25 04 / 71 13.

ĉon la 1an de junio 1969 al la pinto de la belfrido de la fortikaĵo „Rosenberg“ povis vidi anstataŭ la kutima Kronaĵa flago la „verdanan stelon“. Laŭ iniciato de nia kolego Wollbacher la nordbavaraj Esperantistoj (NOBELO) kunsidis du tagojn en la fortikaja gastejo. Car, kiel raportis detale la gazetaro unu semajnon antaŭe, okazis tiutempe la jarĉefkunveno de la NOBELO en Kronaĵ, en tiu bela mezepoka urbo, kiu eble estas iomete konata laŭ nia Esperanto-prospekto.

La kunveno konsistis el 3 partoj, nome la publika informvespero je la sabato, Diservo en Esperanto kaj la jarĉefkunveno mem dimanĉe. Simpatiojn al Esperanto montris i. a. la federacia parlamentano Hofmann, landa parlamentano Hempfling, subdistriktestro d-ro

Emmert kaj la unua urbestro Popp de la urbo Kronaĵ. Landa parlamentano Hempfling akcentis precipe la ŝancon, kiun prezentas Esperanto al la malgrandaj popoloj. „Lingvoj pli interligas ol raso“ konstatis urbestro Popp laŭ siaj salutvortoj, kiujn li spicis per humorajoj pri propraj spertoj fremdlingvaj. La jarĉefkunveno ankaŭ partoprenis kun intereso la unua urbestro Popp kaj la ĉefadministranto de la germana sindikata asocio, sekcio Kronaĵ.

Estrara komuniko

La dua sekretariino, s.ino Kruse ricevis novan telefonnumeron, ŝi estas atingebla nun sub la n.ro 3280. Ciuj aliaj indikoj restis la samaj.

Notu bone: 13a GEFA-jarkunveno en Augsburg 17a — 19a de oktobre 1969.

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main).
Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen-Ohligs, Meteorstraße 13. Druck/preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojistia Asocio.